

14611 Zonoparto kontrolata de regejo, por kiu manovristo povas ricevi rajton de loka flegado, inkluzive de trajnvetura sekurigo sen signalil-dependeco.
 angla *Local Shunting Area* germana *lokaler Rangierbereich*
 franca *zone de manœuvre locale*

terminpropono:
manovradzono malsaltebla de regejo

14389 Punkto en minimuma distanco al trakforko aŭ trakokrucaĵo, determinanta limon inter traccirkvitoj de anoncosistemo pri libera trako, por sekurigi ke veturilo sur unu trako ne obstaklu veturon sur la alia trako.
 angla *clearance point* germana *Freigabepunkt*
 franca *point de dégagement*


terminproponoj:
1) traccirkvitlimo ĉe disforkiĝo
2) disforkiĝa liberigpunkto

14510 Traccirkvitsekcio de anoncosistemo pri libera trako, ne senpere apartenanta al itinero, sed unufine transiĝanta la koncernan trakokonverĝan limpunkton.
 angla *fouling TVP section* germana *nicht grennzeichenfreies Gleis*
 franca *engagement d'une section d'annonce de libération de la voie - TVP*

terminproponoj:
1) traccirkvitsekcio trans trakokonverĝa limpunkto
2) traccirkvitsekcio en postsignalila sekurecdistanco

Pro ne bone kompreneblaj difinoj jen klarigo per apudaj skizoj:

14389: La punkto troviĝas en distanco al trakokonverĝa limpunkto (04135) laŭ maksimuma distanco inter bufrodisko kaj ekstera radakso. Ĉe la punkto estas instalita izoladjunto.



14510: La sekcio troviĝas malantaŭ koncerna itinero en ties postsignalila sekurecdistanco (01611). Okaze aranĝon de la itinero ne eblas veturo sur alia konverĝanta trako.

Lasta informo de UIC

La evoluigo de reta versio *UIC TermEdit* por klientoj, do ankaŭ por niaj kunlaborantoj, ankoraŭ daŭras pro komplika administrado de 26 lingvoj. Ni havu paciencon.

Agrablan someron elkore deziras *Heinz Hoffmann*.

Terminara Kuriero

TeKu 147

Junio 2013

Komunikilo de Terminara Sekcio en F3ka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør
 Poŝtelefono: +45 71 70 63 83 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul
 Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablenail.de

NEKROLOGO

La 12-an de Januaro 2013 mortis nia kara franca terminara kunlaboranto **Marc Noulin** en sia 82-a vivojaro. Profesie li laboris pri sekureco de fervojaj instalaĵoj kaj atingis kvalifikiĝon Unuaklasa Staciestro. En IFEF-Terminara Sekcio li precipe tradukis francajn difintekstojn en Esperanton. Li estis membro de SAT-amikaro. **Marc Noulin** daŭre estos en nia memoro. Li ripozu en paco.



Karaj gekolegoj,

en TeKu 140 (Decembro 2010) mi informis, ke surbaze de diskutrezulto en Sofio, mi sendis ŝanĝproponojn al PIV-responsulo. En la reta PIV-versio <<http://vortaro.net>> estas legebla la aktuala stato de korektoj. Jen rezulto de mia serĉado:

Pri aktualaj PIV-korektoj

- Okazis jenaj korektoj en senco de niaj proponoj:
 - Verboj **eikargi** kaj **transkargi** estas enigitaj (TeKu 139, paĝo 2).
 - **movi 2**: La modifita difino enhavas pozicioŝanĝon ankaŭ de objekto (TeKu 139, paĝo 2).
 - **vagonaro**: La iama difinkomenco „Unuo ...” estas korektita al „Kompleto ...” (TeKu 120, paĝo 4).
 - **vagono kaj trajno 2**: La modifita difino ebligas terminuzon ankaŭ ĉe aliaj transportsistemoj (TeKu 140, paĝo 1).
 - Sufiksoj **-ad-** kaj **-iĝ-** estas enigitaj ĉe parkadtrako, ranĝadmonteto, ranĝadstacio, ruliĝekipaĵo kaj ruliĝrelo.
- Okazis korektoj aliaj ol niaj proponoj:
 - **loĝistiko**: Anstataŭ nia propono (TeKu 140, paĝo 1) estas enigita jena difino: Tuto de la rimedoj, kiuj ebligas bonan funkciadon de entrepreno, interalie koncentradon kaj proviantadon de armeo.
 - **pramo**: Anstataŭ nia propono aldoni derivaĵon „pramsipo” (TeKu 120, paĝo 3), sole la iama difinkomenco „Granda ŝipo ...” estis ŝanĝata al „Boato aŭ ŝipo ...”.

3. Bedaŭrinde (ĝis nun) ne okazis korektoj laŭ niaj proponoj:

- **radiofonio**: La termino restas evitinda sinonimo por radiotelefonio (TeKu 139, paĝo 1).
- **ŝarĝo 2**: La sinonima difino kiel ĉe kargo restas (TeKu 139, paĝo 2).
- **ŝarĝisto, elŝarĝi, transŝarĝi**: La terminoj restas spite al enigo de „elkargi” kaj „transkargi” (TeKu 139, paĝo 2).
- **talusdeklivo**: La nocio ne estis enigata por diferencigi inter tridimensia taluso kaj dudimensia talusdeklivo (TeKu 139, paĝo 1).
- **terminalo 2**: La nocio ne estis enigata kiel trafika nocio (TeKu 140, paĝo 1).
- **trako 2**: La restanta difino ne ebligas terminuzon ankaŭ ĉe aliaj transportsistemoj (TeKu 140, paĝo 1).

4. 25-an de Majo mi petis korekton de jena memfarita gramatika eraro: La terminoj "bloksekcio" kaj "bloksistemo" vere rilatas ne al bloko, sed al blokado. Sekve ĝustas

- **blokadsekcio** Kantono ekipita per blokadsistemo.
- **blokadsistemo** Teknika aranĝo ĉe kantonigita fervojlinio por certigi sekuran senperan trajnsinsekvon.

La koncernajn terminojn en *UIC*-datumbanko mi jam korektis.

Termindecidoj ĉe kunsido en 65-a IFEF-kongreso en *Artigues-près-Bordeaux*

el TeKu 145:

00999	relvojhelico	laŭ propono 2
07183	trakobukio returna	laŭ propono 1
08835	trako distribua	laŭ unusola propono
09749	trako distribua klientpriserva	laŭ unusola propono
09742	ne traktita pro difinmanko kaj ĥaoso en nacilingvaj terminoj	

el TeKu 146:

12447	itinerkontrolo persona rigarda	laŭ propono 1
14570	vidu sube	
14690	vidu sube	
99828	disforkiĝo unutraĉa	laŭ nova propono sendita de <i>Jaroslav Matuška</i>
	Por eviti miskomprenon pri unu-el-unu-traka mi aldonis noton: (el du trakoj)	
99829	disforkiĝo dutraĉa	laŭ nova propono sendita de <i>Jaroslav Matuška</i>
14577	disforkiĝo kruca	laŭ propono 1
14660; 09502	sinkrone kondukata trakciilaro	laŭ nova propono sendita de <i>Ladislav Haki</i>
03825	sinkrona kondukado de trakciiloj	laŭ propono 2
08954	sinkrone kondukata pluropa traktio	laŭ nova propono sendita de <i>Ladislav Haki</i>

La partoprenantoj en *Artigues* ne decidis pri nocioj 14570 kaj 14690. Ili petis pri denova diskuto surbaze de pliaj nacilingvaj klarigoj. Jen miaj koncernaj rimarkigoj:

La Esperanto-difinoj en TeKu 146 estas tradukitaj el germana, kaj laŭ enhavo respondas ankaŭ al angla kaj franca lingvoj. Nek ni nek alilandaj tradukantoj rajtas enigi aldonajn karakterizaĵojn.

Ankaŭ mi konstatas, ke la difinoj tre malclare montras diferencon inter 14570 kaj 14690. Mi konkludas ke nocio 14570 temas pri adapto de teknikaj sistemoj, sekve proponas "intersistema funkcieblo", dum en nocio 14690 estas aldonitaj reglamenta, organiza kaj jura adaptoj. La germana adjektivo *betriebliche* povas signifi kaj "entreprena" kaj "ekspuata". Ĉi tie la termino "interfervoja operacieblo" mia opinio sufiĉe taŭgas.

Al ambaŭ proponoj en TeKu 146 antaŭkongrese rete jesis 4 kunlaborantoj. Sekve mi jam enigis la terminojn en la *UIC*-datumbankon. Se estiĝos denova diskuto kun aliaj decidoj ĉe sekva kongreso, mi facile povos korekti.

Novaj taskoj

El la nova terminamplekso (kun nur anglaj, francaj kaj germanaj terminoj) enigita de Internacia Fervoj-Unio *UIC* jen grupo de kvar nocioj koncernantaj komutadon ne tute lokan, ne fare de regejo, do lokproksiman, kaj du nocioj pri trakcirkvitoj:

14512 Unu trakforkmanipula levumilo aŭ grupo de tio, por lokproksima mekanika komutado de trakforkoj kun ties signaliloj, sen regado fare de regejo.

angla	<i>ground lever frame</i>
franca	<i>levier à pied d'œuvre</i>
germana	<i>mechanisches Stellwerk</i>

terminpropono:

komutejo lokproksima mekanika

14701 Instalaĵo por lokproksima komutado de trakforko aŭ trakforkogrupo.

angla	<i>local point operating panel</i>
franca	<i>panneau local de manœuvre d'aiguilles</i>
germana	<i>Bedienpanel für lokale Weichen</i>

terminproponoj:

- 1) **komutejo lokproksima regpanela** (laŭ nacilingvaj terminoj)
- 2) **komutejo lokproksima** (laŭ difino)

14609 Regmaniero por komuti trakforkon aŭ trakforkogrupon per lokproksima komutejo, kun ebla samtempa sekurigo per kontrolanta regejo.

angla	<i>local point operation</i>
franca	<i>exploitation locale d'aiguille</i>
germana	<i>lokaler Weichenbetrieb</i>

terminpropono:

komutado per lokproksima komutejo